La kamelo foje plendis al Jupitero ke li ne estis tiel bone provizita kiel li devus esti por defendo kaj ofendo. "La bovo," diris li, "havas kornojn; la porko dentegojn; kaj la leono kaj tigro timegindajn ungegojn kaj kojnajn dentojn kiuj kaŭzas, ke oni ĉie timu kaj respektu ilin. Mi, aliparte, devas toleri la insultojn de ĉiuj kiuj volas min insulti."

Jupitero kolere diris al li ke se li nur pripensus, li vidus ke al li estis donitaj kvalitoj posedataj de nenia alia besto; kaj ke, kiel puno pro lia malsaga plendo liaj oreloj estos mallongigataj.

Homo ne ĉiam scias tion, kio estas por li plej bona.

### *La Koko kaj la Juvelo*

Malsata koko, ungratante por nutraĵo inter la pajloj en la garbejkorto, okaze elturnis juvelon. Sentante tute certe ke ĝi estas io multekosta, sed ne sciante bone kion fari je ĝi, li alparolis ĝin kun mieno de afekta saĝeco:

"Vi estas tre bela, sendube, sed vi tute ne estas agrabla laŭ mia gusto. Por mia parto mi plivolus havi bonan horderon ol ĉiujn juvelojn de la mondo"

Io havas valoron nur laŭ sia utileco.

# LITERATURO

## LA MAGIO DE FIDELA LABORO

ARTHUR BAKER

EN la kvardeka jaro de sia regado Bimluŝ, reĝo de la granda Lando Transmonta, enuiĝis je la vivo. Kiam oni estas estinta dum kvardek jaroj reĝo sen konkuranto, oni povas elĉerpi ĉiujn ordinarnajn metodojn por la amuzado. Kaj tion Bimluŝ (la pacon de Oziris al lia spirito!) estis farinta. La historiisto estis longe kaj vigle leginta al li rakontojn plej verajn pri liaj reĝaj praavoj, ĝis Reĝo Bimluŝ enuiĝis kaj ordonis ke la ĉefa ministro eltranĉu al la historiisto la langon. La poeto estis skribinta kaj leginta milojn da versoj pri la gloro kaj beleco kaj forto de Reĝo Bimluŝ. La poeto daŭris multe pli longe ol la historiisto, sed en la fino de la finoj ĉio fariĝas enuiga, kaj la reĝo ŝtopis per spado la gorgon de la poeto.

Tutsame okazis pri la aliaj amuzaĵoj pri kiuj la homa koro ĝojegas, sed en kiuj sole la reĝoj povas sin indulgi sen limo kaj sen malhelpo. Bimluŝ portigis al si el ĉiuj partoj el sia regno kaj eĉ el eksterlande famajn kuiristojn, kaj ili kuiris por la reĝo la plej ravajn manĝaĵojn. Ĝis preskaŭ ekkrevo Bimluŝ manĝadis kaj englutadis, sed tio ankaŭ fariĝis tediĝa kaj unu tagon li ordonis al la ĉefa militisto ke li kuiru la kuiristan ĉefon en lia propra bakejo. Li sendis grandan armeon en malproksiman landon por la sola celo reporti al la reĝo la plej ardajn vinojn kaj likvorojn. La reĝo trinkegis, kaj ĉiuj korteganoj aplaud-

egis, deklarante ke neniu alia reĝo en la mondo povus malplenigi tiel grandan pokalon. Oni alportis porkidon kaj metis ĝin sur la tronon kaj Bimluŝ kaj ĉiuj korteganoj genuis antaŭ ĝi. Bimluŝ ordonis plenigi la banejon per vino, kaj kun la gekunuloj de la kortego li naĝis en vino, dum sklavoj gardis ilin kontraŭ droniĝo. Eĉ tiaj paradizaj plezuroj sengustiĝis post kelkaj jaroj.

Oni elkaptis el ĉiuj partoj de la lando la plej belajn knabinojn. Dum ses monatoj oni banis ilin, kaj poste dum ses monatoj oni parfumis ilin. Vestite per la plej ravaj vestoj ili faris logajn dancojn antaŭ Bimluŝ, kaj el tuta cento da tiaj belaĵoj li elektis laŭ la reĝa kaj nekontraŭebla volo. Tio daŭris longe kaj pogrande, kaj la reĝo naskigis tiom da homoj kiom neniu el liaj praavoj naskigis, kaj ree ĉiuj akklamis kaj laŭdis Bimluŝ kiel la plej faman kaj gloran el ĉiuj reĝoj. Laŭfakte, en tiom da manieroj Reĝo Bimluŝ konstatis sian superhoman kaj superreĝan karakteron, ke la popolamaso deklaris, ke li estas nek homo nek ordinara reĝo, sed iu dio en reĝa formo kaj figuro. Tio plaĉis al la reĝo pli multe ĉar li jam enuiĝis je la virinaro kaj edzinaro, kaj li ordonis al la pastroj konstruigi templon por li. Tie li sidadis kun tia soleneco, kian homoj ŝatas en siaj dioj. La pastroj avertis lin, ke oni ne povas fari sukceson kiel dio, ne lasante la homajn ĝojojn. Tiam (des pli volonte ke li jam enuiĝis je ili) li ordonis ke oni konduku antaŭ li tricent el liaj virinoj, kaj oni senkapigis ilin kiel atesto pri la superhomiĝo de la

reĝo. La popolo laŭtege aprobis tiun noblan oferon, ĉar ĉe tricent virinoj de reĝo estas multe da imposto kaj elspezo.

Nun estas la kvardeka jaro de la regado de Bimluŝ, reĝo de la lando transmonta, filo de la suno kaj dio de la Transmontanoj. Li havas sepdekon da jaroj kaj li estas elĉerpinta ĉiun plezuron de la homoj, de la reĝoj, kaj de la dioj. Li forte enuas kaj sendas al la ĉefa pastro la vorton: "Venu!"

Kaj kiam venis la ĉefa pastro Reĝo Bimluŝ diris al li:

"Dum sesdek jaroj vi servis en la temploj la diojn. Ĉu estas kredinde, ke ili kaŝas al vi ian saĝon?"

"Reĝa moŝta," respondis la ĉefa pastro, "la dioj estas la dioj. Vi estas la reĝo de la tero, sed la finojn de la tero vi ne konas. Mi estas la ĉefa pastro de la dioj, sed la saĝon de la dioj mi ne konas. Se vi, reĝo de la tero, kaŝas sekreton kontraŭ viaj ministroj, des pli bone la dioj, regantoj de la tero kaj la ĉielo, devus sekretigi iom da scio al siaj pastroj. Jam vi enuis kaj lasis vian pretendon esti dio. Jam mi enuas kaj volas lasi mian propran pretendon esti intimulo de la dioj; ĉar la du pretendoj diferencas nur en grado, kaj neniel en karaktero."

"Sed mi ne volas fari kun vi teologian diskutadon. Mi nur volas ke vi konfesu ke vi estas la plej saĝa homo en mia regno."

"Se vi tion volas, mi konsentos ke, escepte je via reĝa moŝto, mi plej intime esploris la vojojn de la saĝo."

"Estas bone. Do aŭskultu! Mi, Bimluŝ la reĝo, jam elĉerpis kaj eluzis ĉiujn miajn proprajn metodojn por la amuzado. Mi enuas, kaj vi devos distri min per io nova. Via supera saĝo instruos vin pri tio. Se el via kapo vi ne povas elhavi unu novan ideon, ĝi ne plu utilas al vi, kaj pli volonte ol vidi vin

Sargita per senutila kapo mi ordonos al mia ekzekutisto ke li liberigu vin de ĝi. Mi, Bimluŝ la reĝo, estas parolinta. Iru kaj faru pripenson."

La ĉefa pastro bone komprenis la staton de la reĝa menso, sed ĉar li ne volis ŝajnigi, ke li sen pripensado konsilus ion al la reĝo, li foriris kaj restis dum kelkaj tagoj en ia templo. Poste li faris humilaĵojn antaŭ la reĝo kaj diris:

"Plej reĝa filo de la suno, ekzistas ankoraŭ al vi nur unu maniero vin amuzadi. Ĝi estas respektinda kaj antikva homa metodo. Oni donas la plejparton el sia vivo al petolaĵoj. Oni trinkas kaj mangas, oni ekziĝas laŭvole kaj naskigas idojn, oni ricevas la aplaŭdojn kaj akklamojn de la popolarĥaso; sed ĉe ĉio estas troeco, kaj la ĝuado mem detruas la povon ĝuadi. Nun restas por vi starigi librejojn kaj templojn. Tio estas la amuzado de maljunuloj kiuj estas eluzintaj la aliajn metodojn por sin amuzi. Tion faris la fama Ramzes en la centkvindek-tria jarcento, kaj tion faris la glora Andru kaj lia edzino, Karnegino, dum la ducent-dek-unua jarcento. Tion do faru vi. La reĝo sin amuzu per la arĥitekturo. Se mia konsilo iom valoras al vi, estas bone; se ne, mi estas parolinta mian lastan vorton."

Sed Bimluŝ la reĝo sentis preskaŭ ekstazon pro la penso pri nova (al li) rimedon por la amuzado. Li kunvokis ĉiujn regatojn kaj faris al ili la jenan paroladon:

"Mi, Bimluŝ la reĝo, plej glora, plej fama, la sankta filo de la suno, volas amuzadon. Bone vi scias, ke la mal-superaĵoj estis kreitaj por amuzi la superaĵojn. Vi lasis al mi enuiĝi kaj tial mi proklamas kondamnon al morto kontraŭ ĉiu el vi. Pretigu vi do cent milojn da grandaj korboj, kaj poste oni plenigos ilin per viaj sentaŭgaj kapoj."

La tuta regataro falis genuen kaj batis teren la fruntojn tiel forte kaj sincere ke la sono similis al nokta kurado de timigita bovaro. Ili ellasis ploregon laŭtan kaj larĝan kaj komencis manĝi la teron kiel signomontro pri sia submeto al la reĝa volo.

“Ĉesu!” kriegis la reĝo. “Viaj buŝoj ne taŭgas manĝi la sanktan teron antaŭ mia palaco: Sed sciiu vi, ke plaĉas al via reĝo prokrasti dum iom da tempo vian ekzekuton. Aŭdu la kondiĉojn. Mi estas decidinta ke de nun mi amuzos min per la arĥitekturo, kiel faris la fama Ramzes kaj la glora Andru. Mi dediĉas al la konstruado de temploj dek jarojn. Vi ĉiuj laboregu! Tiuj el vi, kiuj konstruos la plej gloran templon, ricevos pardonon kaj vivon el mia dekstra mano, kaj oron el mia maldekstra mano. Kaj ĉiuj el vi, kiuj konstruis aŭ helpis iamaniere en la konstruado de la malpli gloraj temploj, mi enfermos en tiuj temploj kaj bruligos kune kun la konstruaĵoj. Vi estas aŭdintaj la vorton de Bimluŝ, filo de la suno. Rapidu!”

Prokrasti dum dek jaroj la morton estas al ordinara homo meti ĝin preskaŭ ekster la penson. Reveninte hejmen la plimulto el la regatoj de Bimluŝ dediĉis sian liberan tempon al la fiŝkaptado kaj batis siajn edzinojn kaj infanojn laŭ la antaŭa kutimo. La reĝo ne koleris pri la prokrasto, ĉar li bone amuzis sin pensante pri la estonta plenumo de sia promeso. Tamen, post kelkaj monatoj juna viro marŝis tra la lando, kriante:

“Jen mi desegnis belan templon! Venu metiistoj kaj helpu konstrui!”

La homoj nemulte atentis lin, kaj post tuta jaro li ricevis aliĝon de nur malmultaj. Sed tio ne senkuraĝigis lin, kaj sterninte sian desegnaĵon sur tablo li komencis la laboradon, uzante la proprajn manojn kaj ricevante helpon de siaj kunuloj. En la sanktaj tagoj multaj

petolaj homoj vizitis lian laborejon. Ili faris tre interesajn parolojn.

“Ho, kia bela desegnaĵo!”

“Jes, sed tute neeble konstrui laŭ ĝi.”

“Fi! mia patro estas lakeo en la domo de arĥitekturisto, kaj mi promesas al vi, ke la unua vento forportus la tegmenton de tia templo. Ĝi tute ne estas scienca afero.”

“Bela ĝi estas! Sed tute ideala! Kaj vidu—nur dekdu personoj laboras je ĝi, kvankam dudek mil ne povus konstrui tian templon en dek jaroj!”

“Kiu estas la freneza arĥitekturisto?”

“Perseo estas lia nomo.”

“Mi neniam aŭdis pri li.”

“Nek mi!”

“Kaj li kuraĝas pensi ke sen famo, sen mono kaj sen metiistoj li povas konstrui la plej belan templon en la Lando Transmonta! Naive!”

Aŭdinte la dirojn de la kritikuloj dum li pasis portante ŝtonon, Perseo diris simple:

“Kiu ne volas nin helpi, tiu lasu nin labori pace.”

Dum kelkaj jaroj tio daŭris. Sed pro la beleco de la desegno kaj la senlaca laboro de Perseo kaj liaj kunuloj multaj metiistoj varbiĝis al ili, kaj anstataŭ dek du ili estis dek du miloj. La reĝo interesiĝis kaj la kleruloj vekigis. Ili havis kunvenojn kaj serioze interdiskutadis. Antaŭe la lertuloj de la arĥitekturo estis dirintaj: “Tri metroj da tia muro ne povus stari unu sur la aliaj.” Sed jam ĝis alteco de dudek metroj la muroj kreskis, kaj la belaj konturoj de la templo elstariĝis multe pli belaj, ol en la desegnaĵo.

Tiam ĉiuj memoris pri la vortoj de Bimluŝ, filo de la suno, ke li diris:

“Tiuj el vi, kiuj konstruos la plej gloran templon ricevos pardonon kaj vivon el mia dekstra mano, kaj oron el mia maldekstra mano.”



Venis multegaj al Perseo kaj petis lian permeson helpi en la konstruado. Ĉio iris rapidege kaj bonege. Sed inter tiuj kiuj venis estis kleruloj en malgranda nombro sed grandega memkonfido. Ili venis ne por labori, ĉar ili superis laboron, sek ili volis kritiki.

“Vi faris naivan pekon,” ili diris al Perseo, “desegnante tian grandan konstruaĵon ne petinte nian helpon. Estas tute neeble ke unu sola homo faru tian laboregon sen helpo kaj konsilo.”

“Mi respektas vian kritikon kaj dankas vian bonvolon, sinjoroj,” respondis Perseo. “Mi konfesas, ke la konstruata templo havas neperfektaĵojn, kaj se mi ree estus desegnonta, mi sendube farus ŝanĝojn.”

“Sed pro kio ne nun akcepti nian konsilon kaj helpon? Ni kune detruos la ĝisnunan laboron kaj faros novan desegnon.”

“Unue, templo konstruita estas pli bona, ol templo konstruota; due, se vi detruos la laboron de miaj kunhelpintoj (kaj ili tion ne permesus) vi ne facile trovus aliajn laborantojn; trie, vi enmetas vian saĝon iom malfrue; vi nur ridis kaj ne konsilis en la komenco de la afero. Adiaŭ—mi estas okupata.”

La kritikuloj je tio decidis, ke devas esti nova konstruaĵo. Ili estis tute sinceraj homoj, kaj tre kredis, ke fari ion sen ilia konsilo estas malsaĝe. Ili tuj organizis la Komitato por la Plibona Templo, kaj faris alvokon al la laborantoj. Kelkaj laborantoj alvenis al ili kaj demandis: “Kie estas la desegno?”

“Sed ho!” respondis la klera Komitato, “tie ĝuste kuŝas la difekto ĉe Perseo! Li konstruis ĝin laŭ rigida desegno, kaj li mem eĉ faris la desegnon. Malsaĝe! Niaj laborantoj ne devos sekvi sklave ian desegnon.”

“Bone; sed ĉar mi nur scias haki ŝtonojn, mi revenas al Perseo kaj lia de-

segno,” respondis unu laboranto.

“Se vi preferas esti subulo al ia arkitektura ĉefo, faru tion,” diris la Komitato por la Plibona Templo. “Sed jam nun ni povos konvinki vin pri kelkaj eraroj en la konstruo de tiu templo. Nur vidu!”

Kaj ili sciencoze parolis al la laborantoj per arkitekturaj terminoj, frapetante ilin dolĉe al la dorso kaj laŭdante ilin flate. La plimulto ne komprenis la terminojn kaj baldaŭ konvinkiĝis, ke la Komitato ne portas ion bonan. Sed kelkaj rapide lernis ripeti la terminojn kvankam ne komprenante ilin, kaj ili familiare parolis al la kritikuloj kaj reciproke metis la fratan manon al la sultro de la kleraj personoj. Tiuj tion toleris, ĉar ili bezonis ĉian helpon.

Dum la tuta tempo la templo de Perseo kreskis je mirinda rapideco kaj ĉiun tagon ĝiaj belecoj pli montriĝis. La kritikuloj konvinkiĝis ke ĝi baldaŭ estos finita se ia rimedo ĉesigi la laboradon ne sin prezentos. Tial ili aĉetis cent ĥigrajn sklavojn kaj cent blankajn bovojn. Ili sidigis la cent nigrajn sklavojn sur la dorsojn de la cent blankaj bovoj kaj kondukis ilin meznokte tra ĉiuj stratoj de ĉiuj urboj. Ili devigis la sklavojn kriegi per sonora tomba tono:

“Ho ve! ho ve! disfalis ĉiuj muroj de la templo de Perseo! Oooo! Oooo! Oooo!”

Tio estis mirinda ruzo. En la mallumo la urbanoj ne povis vidi la nigrajn sklavojn, sed vidis nur la blankajn bovojn. Ili pensis, tial, ke la blankaj bovoj parolis, kaj ĉe transmontano blanka bovo estas sankta besto, same kiel en antikva tempo blinda tigro estis sankta besto ĉe kelkaj usonanoj. En la morgaŭa tago oni multe parolis pri la terura okazo, kaj en malproksimaj urboj diris ke pereis sub la falintaj muroj kvardek mil laboristoj! Multaj kiuj

volis iri helpi en la konstruado revenis hejmen, opiniante ke la ofenditaj dioj parolis per la sanktaj bovoj. Eĉ en la reĝa urbo estis malfacile konstati la veron al la popolo.

“Jen! jen!” diris ĝojanta knabino al blankabarba maljunulo. “Vidu! la templo ankoraŭ staras kaj oni ankoraŭ laboras. La blankaj bovoj eraris!”

“Ha,” murmuris la maljunulo, “la junaj homoj! la junaj homoj! kiel ili estas memkonfidaj kaj sendiaj! Ili kredas al siaj propraj okuloj pli volonte ol al la voĉo de la blankaj bovoj! Tiel defalas la pieco! Nur hieraŭ mi vidis knabon, kiu pasis la kaĝon de la sankta virkapro kaj ne preĝis—senhontuleto!”

Perseo tuj sendis knabon rajdi sur azeno tra ĉiuj urboj kaj krie al la popolo ke la templo ankoraŭ staras kaj kreskas. Tamen, la azeno ne estas sankta besto kaj la knabo portis bonan novaĵon; kaj eĉ en la Lando Transmonta bona novaĵo sur azeno ne povas fari kuradon kontraŭ malbona novaĵo sur blanka bovo. Sed post kelkaj monatoj laborantoj denove komencis veni al Perseo.

Tiam la kritikozia Komitato elpensis novan planon tiel simplan, ke estas mirinde ke homoj tiel kleraj ne antaŭe elverkis ĝin. Proksime de la templo de Perseo staris granda monto. Preter la monto estis la reĝa vojo. La Komitato nun starigis sian oficejon sur kampo ĉe la alia flanko de la monto.

Ili pretigis grandegan ŝtonon el blanka marmoro kaj aĉetis blankan sklavon. Per forta trabaro ili levis la ŝtonon, grandan kiel domo, sur la ŝultrojn de la cent nigraj sklavoj. Sub la ŝtono marŝis la blanka sklavino, vestita per blanka robo. Ŝi tenis la manon kontraŭ la ŝtono, kaj pro tio, ke tiel nigraj estis la sklavoj kaj tiel blanka la sklavino, la urbanoj povis vidi nur la sklavon. Ŝajnis, ke ŝi portas la ŝtonon. Meznokte

la blanka sklavino marŝis tra la stratoj, portante blankan ŝtonon, grandan kiel domo. Kaj ŝi kantis per gaja kaj alloga voĉo:

Laŭ ordonoj vere diaj  
Sekvu laŭ la paŝoj miaj.  
Sankta estas konstruado.  
Pia estas laborado.  
Portu ŝtonojn por la templo—  
Estas jen por vi ekzemplo!

Nur diino marŝas meznokte laŭ stratoj portante ŝtonon grandan kiel domo. Tial ĉiuj kredis ke ŝi estis diino, kaj la morgaŭan tagon centoj da homoj rapidis laŭ la vojoj portante ŝtonojn por “la templo.” Samtempe, la du sekretarioj de la Komitato por la Plibona Templo (kiu ankoraŭ ekzistis nur sur la oficiala leterpapero) starigis sin sur la reĝa vojo ĉe la kontraŭa flanko de la monto, el kie oni ne povis vidi la templon. Ili ĝentile salutis ĉiujn venantojn, afable demandis pri la sano de la parencoj, kaj poste sekvis kunparolo:

“Vi venas por helpi en la konstruado de la templo?”

“Jes, moŝto.”

“Do bonvolu enskribi vian nomon en nia registro de la Amikoj al la Ideo Pri la Konstruado de Templo. Dankon. Nu, jen estas la loko, sur kiu oni konstruos la templon.”

“Sed ni multe aŭdis pri la templo, ke oni jam preskaŭ finis la konstruadon.”

“Tio estis vera, sed oni faris eraron en la desegno, kaj tio tiel malplaĉis al Oziris, ke li sendis cent blankajn bovojn kiuj dispuŝis ĝin meznokte kaj poste la tero malfermis kaj englutis ĝin. Tiam la bovoj forflugis.”

“La samaj! la samaj! Antaŭ nelonge blanka bovo marŝis laŭ niaj stratoj kriante, ke la templo disfalis. Mirinde!”

En tiuj tagoj kolektiĝis sur la kampo de la Komitato kelkcentoj da homoj,

kun multe da ŝtonoj por la konstruado. Kelkaj el la simpluloj volis demandi, kie estas la desegno por la templo.

“Ĉar vi estas nur metiistoj, vi faras tiajn demandojn,” respondis altamaniere la kleruloj, “sed laŭ la speciala ordono de Oziris, ni konstruos la novan templon laŭ la scienca magio.”

“Kaj tio estas—?” petis kampulo,

“Simple tio ĉi,” respondis unu el la kleraj personoj. “Ni kolektos kune mil homojn; kiam ajn dek el la mil interkonsentos precize pri ĉiuj detaloj de la desegno, Oziris faros fingrobaton kontraŭ la montegon kaj la templo, tute konstruita, elsaltos el la tero.”

Kelkaj malpiuloj ne kredis al tio, sed oni devos diri, ke la plimulto el la Transmontanoj estis bonmoraj kaj indaj homoj; kaj ĉar Oziris efektive faras multajn miraklojn en ilia lando, ne povas ekzisti la plej malgranda dubo, ke la komitato agis bonafide kaj honeste. La novaĵo pri la konstruota Perfekta Templo disflugis rapide tra la tuta lando. Amasoj kolektiĝis ĉe la templo de Perseo kaj per fortaj voĉoj oni vokis al la laboristoj kiuj laboris sur la supro de la altegaj muroj:

“Venu malsupren! La afero estas finita kaj vi perdis la venkon!”

“Kio estas?”

“Nur tio, ke ĉe la kontraŭa flanko de la monto estas templo tiel granda kaj bela kaj glora, ke en komparo la via ŝajnus nur kokokago.”

Je tio kelkaj centoj venis malsupren, lavis al si la manojn kaj marŝis trans la monton por vidi la novan gloraĵon. Sed kiam ili vidis nur kampon plenan je diskutantaj kaj petolantaj viroj, ili revenis malbenante energie ke ili perdis iom da tempo. Nur kelkaj kiuj pli ŝatis diskuti ol labori, ne revenis.

Sed en tiu tempo, dum la kritikuloj kaj iliaj varbitoj senfine diskutadis,

aperis subkomitato el dek viroj, kiuj interkonsentis pri ĉiuj detaloj de la Perfekta Templo. La aliaj centoj tuj volis disŝiri ilin, ĉar kompreneble ĉiu homo volis enmeti sian propran ideon. Sed la dek virojn Oziris protektis, sendante anĝelon kun ora pafilego por tiu deĵoro. Oziris mem venis, kaŝite per nubo el diamanta polvo, kaj li parolis el la nubo:

“Plej saĝaj, plej gloraj homoj, se estus permesite al dio tion fari, mi humile genuus antaŭ vi kaj manĝus teron apud viaj piedoj. Vi dek interkonsentis pri ĉiuj detaloj de templo — mirindaj homoj! Bone! Mi mem igos ĉiun detalon centfoje pli bela, ol vi elpensis ĝin, kaj post dek milionoj da homaj generacioj oni parolos viajn nomojn kiel la plej gloraj el la estinta mondo. Nu, mi estas preta liveri morgaŭ la templon. Ian detaleton—kion mi devos gravuri super la pordo?”

Unu membro de la subkomitato starigis kaj diris:

“Plej timinda kaj adorinda potenculo de la ĉielo, mi estas jam farinta por la afero multajn oferojn. Tamen, mi neniam laciĝos en mia laboro por la bono de la homaro, kaj eĉ kiel faris la glora Andru kaj lasis ke oni multafoje gravuru per grandaj literoj lian nomon sur ŝtonoj, mi permesos, ke vi gravuru mian nomon sur la templo.”

Sed tiel oferemaj estas la dek homoj ke ĉiu el ili volis donis sian propran nomon. Naskiĝis pri la malgranda detalo grandega diskuto, en kion tuj venis la tuta aŭdantaro. Oni ŝetis reciproke ŝtonojn, kaj batalegis pri tiu lasta detalo pli forte, ol iam antaŭe. Oziris malaperis, kaj la anĝelo ektimis kaj forflugis, eĉ lasante per sia rapidemo la oran pafilegon. La batalo daŭris ĝis nur unu sola viro restis vivanta. Tiu vidis la oran pafilegon kaj volis forporti

ĝin; sed li ne sciis precize kiel ĝi funkciis, kaj post kiam ĝi subite eksplodis oni ne povus trovi eĉ butonon el lia veŝto aŭ haro el lia ĉapo.

En tiu sama tago oni finis la konstruadon de la templo de Perseo, kaj Bimluŝ la reĝo iris kun granda sekvantaro por vidi ĝin. Li tiel entuziasmiĝis pri ĝiaj mirindaj belecoj ke li dancis pro ĝojo kaj ordonis ke oni gravuru per grandaj literoj la nomon de Perseo sur la ĉefa ŝtono de la templo. Ĉar la ŝtongravuristo ne sciis la ortografion pli bone en la lando transmonta ol ie ajn, li tiel miksis la literojn ke ili faris la vorton

E S P E R O

JES AU<sup>11</sup>NE

Esperantigita el la idiŝa laŭ Libin de  
JOSEFO BRESLER

**M**ALFRUA horo de somera nokto. Mallarga longforma ĉambro. Si sidas, tenante plumon en la mano super la leterpapero. Profunde ŝi pensas kaj pala estas ŝia vizaĝo, pala kiel de mortinto . . . nur la okuloj brulas.

De la tegmento kantadon oni aŭdas. En somera nokto varmega la najbaroj kunvenas sur la tegmenton, kiu estas la sola somera ripozejo por Nov-Jorkaj malriĉuloj.

La maljunuloj ripozas aŭ dormas; la junuloj petolas; oni parolas, ridas kaj kantas ĝis malfrue en la nokto.

Nun ia fraŭlino kantas. Dolĉa, sed malgaja voĉo. Ŝi kantas rusan kanton:

Betulon mi vidis,  
Rompita ĝi estis . . .

El la mano de la fraŭlino sidanta en la ĉambro la plumo elfalas . . . . Ŝi

aŭskultas la kanton . . . . , mallongan tempon ŝi kunkantas:

Betulon mi vidis,  
Rompita ĝi estis . . .

Kaj ŝiaj okuloj pleniĝas per larmoj. Denove ŝi prenas la plumon en la manon. Nur unu vorton ŝi devas skribi: Jes aŭ ne. Tiel li ŝin petis.

Jes, ŝi konas lin, efektive konas tre, tre bone, kaj ŝi tre malamas lin, malamegas!

Tamen, ŝi ne kuraĝas respondi: Ne. Nek severa patro, nek malfeliĉa patrino devigas ŝin al edziniĝo. Ŝi estas libera agi laŭ sia propravolo. Ŝia malfeliĉa koro ripetadas: Ne! ne! ne! Tamen ŝi timegas respondi nee.

☆ ☆ ☆

Kiam ŝi estis juna knabino ŝi loĝis en malgranda urbo en Rusujo. Ŝia nomo estas Rozo, sen oni moknomis ŝin Betulo, ĉar ŝi estis altkreska, bonsana kaj gracia kiel bela betulo.

Okazis malnova historio. Ŝiaj gepatroj volis edziniĝi ŝin kun iu fianĉo, kiun ŝi ne amis. Por kontraŭstari siajn gepatrojn ŝi ne havis kuragon kaj ŝi forveturis Usonon, kie ŝi komencis labori en ŝvitiga laborejo.

Dek du jaroj pasis . . .

Ho ve, kion la fabrikejoj Nov-Jorkaj faras el homo! Ne vane la okuloj de Rozo pleniĝas per larmoj, kiam ŝi aŭdis la kanton:

Betulon mi vidis,  
Rompita mi estis . . .

Rompita efektive ŝi estas. La malvastaj, malhigienaj laborejoj rompis, mortige rompis la sanegan arbon. Malforta estas nun Rozo, tiel malforta ke ŝi apenaŭ povas vivi. Altkreska, maldik-

ega, malgrasa—skeleto! La vizaĝo pale flava, la okuloj enfalitaĵ, la frunto kaj la vangoj tre sulkigitaj. Si havis la aĝon de tridek du jaroj, sed si ŝajnas havi la aĝon de kvardek. De dek du jaroj si laboradas en ŝvitiga laborejo. Si ne havas plu forton por labori, sed kion do si povas fari?

La laboron si malamegas kiel la morton. Ĉiuvespere, kiam si revenas de la laborejo, kaj, pensante ke morgaŭ si denove devos labori, si premiĝas. Sed kion pli bonan si povas fari?

Edziniĝi? Ne estas amantoj. Kiu do volas havi malsanan, laceman fraŭlinon? Neniu!

Antaŭe si facile povis fianĉiĝi, sed si elektadis, volante edziniĝi nur kun persono, kiun si efektive amas.

Kelkfoje si amis, sed ne estis amita, kaj la tempo pasis kaj la fabrikejo faradis sian mortigan efikon.

Rompita arbo si estas nun. Senamika! Neniun si havas ĉi-tie.

Sia loĝeja mastrino afable ekridetas nur kiam si pagas al si por la loĝado. Alie neniu interesiĝas pri si. Eĉ por labordonantoj si fariĝas senvalora. Si rimarkas ke en tiuj ĉi laborejaĉoj oni ne rapide akceptas sin; ne kiel antaŭe, kiam ŝiaj vangoj estis sangruĝaj.

Kio sin atendas?

Tre ofte, kuseno sur kiu si dormas malsekiĝas per ŝiaj larmoj.

Longan tempon si jam tenis la plumon en la manon. Si nur skribis la jenon:

Estimata Sro. N—: Mi ricevis vian leteron. Mi obeas vin, skribante unu vorton . . . .

Plu si ne povas skribi. La plumo tremas en la mano kaj si ne povas skribi la "unu vorton".

Lin si tute ne amas. Si malamas lian fizionomion, lian senharan kapon, lian senvivantan vizaĝon, lian malagrablan

rideton. Si ne amas lin—malamegas!

Ĉu si respondu: Ne?

Nu, kio do fariĝos je si? Eble tiel bona propono reokazos neniam. Li estas la sola homo kiu faris al si tian proponon. Se si perdos lin kio do fariĝos je si?

Ĉu jam ne okazis kelkfoje ke si decidis edziniĝi kun iu ajn, por ke si povu liberigi sin de la eterna terura fabrikejo?

Respondu nee?

Li multe perlaboras . . .

Feliĉego sin ne atendas, tamen si—havas sian ĉiutagan panon . . . . Si fariĝos edzino . . . eble si naskos infanon . . fariĝos patrino, kaj amos . . edukos sian infanon kaj eble havos novan intereson en la vivo . . .

Ĉu si respondu: Jes?

Sed si ja ne amas lin, malamegas!

Respondu: Ne.

Ree la fabrikejo! Kaj kiel malforta si sin sentas.

Kaj ankaŭ la kompataj rigardoj, per kiuj oni rigardas fraŭlinon, kiu ne havis la feliĉon aŭ la lertecon tiel rapide fianĉiniĝi, estas tiel malagrablaj, ho ve! Kiel mizerigaj ili estas!

Denove la kantado komenciĝis sur la tegmento dolĉe kaj malĝoje:

Betulon mi vidis,

Rompita ĝi estis . . .

"Jes," nerve si ekmurmuris, "jes, estas rompita . . . rompiĝis . . . la betulo estas rompita . . . rompita . .

Subite si ekflamiĝis febre. La vangoj komencis brulumi, la okuloj trembrilis.

Nerve si ekprenis la leterpaperon kaj skribis: "Jes." Enmetinte la leteron en la koverton, si skribis la adreson kaj kiel frenezulino elkuris el la ĉambro.

Sur la stratoj si kuris kiel de brulado. En la unuan poŝtkeston si metis la leteron kaj komencis rekuri.

Kiam si revenis en la ĉambron, si

sidiĝis en la saman seĝon, kie ŝi sidis antaŭe, kaj komencis kanti mallaŭte:

Betulon mi vidis.  
Rompita ĝi estis . . .

Kantante ŝi ploris, maldolĉe ploregis.

## LA HEJMOJ DE LA POPOLO

El Henry W. Grady tradukis  
HERBERT M. SCOTT

Mi iris al Vaŝington lasttage, kaj mi staris sur la Kapitola Monteto; mia koro batis rapide dum mi rigardis al la turalta marmoraĵo de mia patruja Kapitolo kaj nebuliĝis la okuloj dum mi pensis pri ĝia grandega signifo, kaj la armeoj kaj la kaso, kaj la juĝistoj kaj la Prezidanto, kaj la Kongreso kaj la kortumoj, kaj ĉio kolektita tie. Kaj mi sentis ke la suno tra l' tuta kuro ne povas alrigardi al pli bona vidaĵo ol tiu majesta hejmo de respubliko kiu instruis al la mondo ĝiajn plej bonajn lecionojn pri la libereco. Kaj mi sentis ke se la honoro kaj la saĝo kaj la justeco restadus tie, la mondo fine dankus al tiu domo en kiu la sankta ŝranko de mia patrujo teniĝas, sian finan altiĝon kaj sian renaskiĝon.

Post du tagoj, mi iris viziti amikon sur la kamparo, modestan homon, kun kvieta kampara hejmo. Ĝi estis nur simpla, senornama domo, ĉirkaŭplantita per grandaj arboj, zonita per herbejoj kaj kamparo riĉaj je promeso pri rikolto. La bonodoro de la diantoj kaj alceoj sur la antaŭkorto miksiĝis kun aromo de la fruktejo kaj de la ĝardenoj, kaj resonis per la klukado de kortobirdoj kaj la zumado de abeloj.

Interne estis kvieto, pureco, ŝparemo kaj oportuneco. Estis la malnova horloĝo kiu salutis, per regula takto, ĉiun novveninton al la familio, kiu tikis la

solenan rekvieron de la mortintoj, kaj estis kunulo de la fleganto ĉe la lito. Estis la ampleksaj, ripozigaj litoj kaj la malnova kamenego, kaj la konata familio-Biblio, fingre markita per manoj jam de longe senmovaj, kaj akvita per la larmoj de okuloj jam de longe fermitaj, tenanta la simplan kronikon pri la familio kaj la konsciencon de la hejmo.

Ekstere, staris nia amiko, la mastro, simpla, virta homo, sen hipoteko pri sia domo nek ŝuldo el sia kreskanta rikolto, mastro de sia bieno kaj mastro de si mem. Estis lia maljuna patro, multjara, tremanta homo, sed feliĉa pro la koro kaj hejmo de sia filo. Kaj dum ili ekiris al sia domo la manoj de la maljunulo sin premis al la junulan ŝultron, metante tien la benon de la honorata kaj danka patro kaj ĝin nobligante per la kavalireco de la kvina Diordono.

Al ili ĉe la pordo venis la patrino kun la krepusko falanta bele sur la vizaĝo, kaj lumiganta ŝiajn profundajn, paciencajn okulojn, dum ŝiaj lipoj, tremantaj per la riĉa muziko de ŝia koro, diris al la edzo kaj filo bonvenon en ilian hejmon. Pretere estis la domedzino, okupata de sia mastrumado, pura je koro kaj konscienco, la ŝildo kaj helpo de ŝia edzo. Laŭ la aleo venis la infanoj, dancante domen post la bovinoj, serĉante kiel vagintaj birdoj la kvieton de sia hejma nesto.

Kaj mi vidis la nokton metiĝi sur tiun domon, falante dolĉe kiel la flugiloj de la nevidata kolombo. Kaj la maljunulo—dum timigita birdo vokis el la arbaro, kaj la arboj akre sonis pro la grila krio, kaj la steloj svarmis sur la ĉielo—kolektis la familion ĉirkaŭ sin, kaj, prenante la malnovan Biblion de la tablo, vokis ilin al preĝo, dum la infaneto sin kaŝis en la faldoj de la patrino vesto, kaj li fermis la kronikon de tiu simpla tago alvokante Dian benon sur tiun familion kaj sur tiun hejmon. Kaj dum mi rigardegis, la vizio pri tiu marmora Kapitolo velkis. Forgesiĝis ĝiaj trezoroj kaj ĝia majesteco, kaj mi diris: "Ho, vere ĉi tie en la hejmoj de la popolo sidas fine la forto kaj la respondeco de nia regado, la espero kaj la promeso de nia respubliko."

## EL TRANS LA MARO

**B**ARCELONA estas la urbo simbole elektita de Cervantes por revenigi Don Kihoton — tiun grandan frenezulon! — en la realan vivon. Vojoj polvoplenaj, gastejoj malpuraj, montoj senherbaj, senhomaj ebenaĵoj estas la arenoj, la turnirejoj de la freneza kavaliro; sendankaj kaptitoj, paŝtantaj brutaroj, muelilaj aloj, procesiantaj religiuloj estas liaj malamikoj kaj kontraŭstarantoj. La kastelo de fantaziaĵoj devas ruiniĝi en Barcelono, kie la sento de la realaĵo estas granda, kaj kie la entuziasmo ŝveligas la korojn sed ne superflugigas ilin kiel aerostatojn. Sur sablaro, hodiaŭ al la maro rabita per la pligrandiĝo de la urbo, Don Kihoto falas venkita de la kavaliro de la Blanka Luno, kaj senarmigita, neniigita, malĝoja, li revenis sur la vojo de la resaniĝo al la fina resaniĝo de sia malsana cerbo. Li forportis kun si la memoron de la presejoj, riĉaĵoj, belegajoj, gastameco de la grafa urbo, kaj ekkriis, pri Barcelono parolante:

“Barcelono, arhivo de la ĝentileco, rifuĝejo de la fremduloj, hospitalo de la malriĉuloj, patrolando de la kuraĝuloj, venĝo de la ofenditoj, afabla korespondado de amikecoj firmaj, kaj senegala pri sidejo kaj beleco.”

Nun, en la nuna ora refratiga tempo, Barcelona estas denove elektita, kiel scenejo de simila akto. Trakuras la homaron, ne nur unu sola kavaliro, sed armeo de frenezaj kavaliroj, kiuj ĉie nur vidas malamikojn kaj kontraŭstarantojn. Nur kiel malamikojn ili rigardas la fratojn pacemajn, laboremajn, trank-

vilajn, kies nura peko estas: esti mal-feliĉaj. La grandaj konstruaĵoj de la moderna kulturo, de la ĉiama kulturo estas por tiaj frenezuloj, nur ensorĉitaj kasteloj, kie, laŭ ili, homo laboradas venĝojn kaj malbonon. La movon de la brakoj, kiuj tra montoj kaj limoj volas sin ĉirkaŭpreni, la frenezaj kavaliroj vidas nur kiel minacon. Kaj ili, kiuj per siaj timoj ĉion malaranĝas, ili paradas kiel repacigantoj de la paco, kiel rebonigantoj de la bono, kiel venĝintoj de tio, kion neniu eĉ pensis venĝi.

Estas necese revenigi tiujn frenezulojn en la realan vivon, montri al ili, ke ni ĉiuj estas amikoj, ke la tiel laŭte proklamita de ili diferenco kaj kontraŭsenteco de la homoj, estas falsa; ke ne estas alia sorĉo, ol la sorĉo de la amo, kaj ne alia malamo, ol la malamo al ili mem. Tio ĉi estos proklamata, kantata, kriegata antaŭ la tutmonda Kihotaro, ne, certe, de la kavaliro de la Blanka Luno, sed ja de la kavaliro de la Verda Stelo, en niaj placoj kaj stratoj, teatroj kaj kunvenejoj. Kiu el vi, karaj gesamideanoj, ne volos ĉeesti tiun gravan modernan batalon? Kiu el vi, frataj sambatalantoj, ne volos partopreni en la rondo, kiun ni faros ĉirkaŭ ambaŭ batalantoj: la malnova, tradicia, erara, atavisma spirito — kaj la frata, ama spirito de Esperanto? Kiu el vi ne volos alporti la bruon de siaj aplaŭdoj al la senarmiligo de la tutmonda Kihotaro? Mi estas certa, ke ĉiuj vi, fidelaj masonistoj de la homara konstruaĵo, ne rifuzos ĝui tiun grandan ĝojon; kaj en la batalo kontraŭ la veraj frenezuloj (ĉar ne ni,

sed ili estas vere tiaj) vi pardonos, ke mi parolas el la reala vivo kaj invitas vin al aliĝo, al alporto de viaj monfortoj en nian organizon, al antaŭvido de ĉiu detalo, lasante nenion por la lastaj momentoj.

Mendu kongreskartojn. Faciligu nian loĝadan laboradon, sciigante nin jam de nun — vi estos plej bone servitaj! Mendu la eldonaĵojn de nia Komitato; vi akiras belajn eldonaĵojn, kaj samtempe vi helpas nian kason. Propagandu, disvastigu, varbu, kaj ne timu ĝeni nin, petante ĉian informon kaj starigante ĉian demandon.

Gefiloj de ĉiu lando! venu Barcelonon restarigi la grandan rondon familian!

*Fred. Pujula y Valles,*

Prezidanto de la Loka Komitato.

Belega luksa Kongreslibro estos senpage donacita nur al tiuj, kiuj sin enskribigos kaj pagos sian kotizon antaŭ la unuan de Aŭgusto. Post tiu dato la libro kostos tri frankojn.

Por reklamo dum la kongreso estus tre utile, se ĉiu kongresano elpendigus ĉe sia fenestro unu standardon Esperantan kaj unu standardon montrantan lian naciecon. La loka organiza komitato povos liveri al la kongresanoj je tre malalta prezo standardojn, sed por ilin ricevi oni devas ilin antaŭmendi.

La teatrajn biletojn, kiuj estos tre malkaraj, oni aĉetos en Barcelono; sed singardeme estus antaŭaĉeti kaj zorge antaŭlegi la tekston de la dramo de Sro. Gual, "Mistero de Doloro."

Pro la malfacileco enkasigi fremdajn mandatojn en Hispanujo, oni sendu la mendojn kun mandato al Sro. F. de Menil (direktoro de *Franca Esperantisto*) 46, Boulevard Magenta, Paris.

La prezo por la kongresa karto estas dek frankoj. Oni aranĝas la loĝadon kaj manĝadon laŭ tri klasoj. Septaga

bileto de Klaso A kostas 35 frankojn; de Klaso B, fr. 52.50; de klaso C, fr. 82.50. Dekoj da kongresaj poŝtkartoj kostas 55 centimoj por No. 1 kaj fr. 1.05 por No. 2. Kongresaj markoj kostas po cento 50 centimojn. Broŝuro "La Rondo," danco esperantista dancota dum la Kongreso, po 30 centimoj. La esperantan standardon, fr. 1; nacia standardo, fr. 2. Teksto de la kongresa dramo, fr. 2. Pri ĉio oni sin turnu al Sro. F. de Menil.

## TERURA STATISTIKULO

Profesoro Bord, feliĉegulo, kiu en Dresdeno ĉeestis la kvaran triumfan kongreson, raportas ke en tiu okazo li havis, kiel kunulo, unu profesoron de matematiko, kies plej granda plezuro konsistas vicigi ciferojn kaj statistiki ĉie kaj pri ĉio.

Jen ekzemplo: tiu nepra matematikisto kalkulis ke, metante unu sur la alian la telerojn necesajn por la kongresistaro oni atingus altecon da du kilometroj! t. e. pli ol ses Efel-Turoj!

Pri la grandioza prezentado de Ifigenio en Taŭrido Profesoro Bord skribas en la bela gazeto *Tra la Mondo*:

"Tamen unufoje mia statistikulo preskaŭ sufokis min. En la luksa operdomo Reicher kaj lia aktoraro ĵus finis la admirindan prezentadon de Ifigenio. La aŭskultantaro entuziasmigita freneze aplaŭdis, kaj ĝis ses fojoj venigis la kur-aĝajn talentplenajn aktorojn sur la scenojn. Tiam mi kliniĝis al la orelo de mia ciferulo kaj mallaŭte diris:

"Ĉu vi ne sentaŝ koran emocijon? Mi estas tute kortuŝita kaj mi neniam forgesos tiun ĉi vesperon."

"Jes! Jes!" li respondis, "se oni estus kaptinta la energion donitan per la aplaŭdantaro, oni havus sufiĉe da forto



## AMERIKA ESPERANTISTO

por elektre lumigi la urbon dum almenaŭ kvin horoj!"

Kaj sinjoro Bord aldonas: "La senkorulon mi preskaŭ insultis."

Kaj tamen Profesoro Bord estis prava? La demandon la leganto mem solvu.—  
*Rene Valton, en Le Monde Esperantiste.*

### SEN SUPERSIGNOJ

Por montri la mirindan adaptebleon de Esperanto Sro. Luis Carlos, ĉefa redaktoro de *Le Monde Esperantiste*, verkis la sekvantan artikolon. Ĝi estas tute bona kaj oni eble ne observus, ke ĝi ne enhava sunu vorton en kiu sin trovas supersignita letero:

La senhalta penado de la veraj defendantoj de la internacia helpa lingvo ricevas en multaj landoj mirindegajn rezultatojn.

En Anglujo, en Francujo, kaj lastatempe en Germanujo dum la okazinta Kvara Kongreso, oni povis vidi mirindan kaj nekredindan spektaklon—tio estas, Esperantistojn el pli ol tridek kvin diversaj nacioj, publike kaj frate alparolantaj unu la alian per unu sola helpa lingvo, Esperanto, kaj aklamantajn la genian elpensinton, Dro. Zamenhof, kiun la Dresdena estraro tiel solene akceptis.

La iama ofte ripetita utopio estas nun vera kaj reala fakto, kaj proksima estas la tago, kiam falos la obstinaj bariloj de la lingva diverseco, nova kaj grandega venko de la homa spirito, kiu senhalte kaj senripoze bataladas por la homara interfratigo!

Tamen, en nia lando oni certe kaj tre efike partoprenis en tiun utilan agadon, sed multaj aliaj Esperantistoj opiniis, ke ilia penado, pro malmultnombroco, ne donis la meritajn fruktojn tiel longe esperitajn en iaj multdiversaj rilatoj.

Tial ili ekkreis en diversaj landoj novajn societojn, sed pli vere rondojn societe familiajn, en kiuj oni diskutadas dum la vesperaj kunvenoj pri la plej bona kaj efika rimedo disvastigi plue nian karan lingvon kaj samtempe alporti helpon kaj subtenon al gazetoj sin donantaj tutplene al la propagando kaj pre-

terlasantaj la nebezonatajn kaj senutilajn lingvajn demandojn kaj diskutadojn.

Tiam, al tiuj samideanaj fervoremuloj novaj, ni nin trafe turnas kaj insiste petadas ilian kunlaboradon; ni nin turnas ne nur al konataj amikoj, sed samecele al la de ni nekonataj samideanoj el la tuta mondo, por ke ili alportu al nian tre malgrandan apogon kaj subtenon partoprenante nian bonvolan kunlaborantaron kaj korespondantaron.

### BEDUENA KANTO

*De Bayard Taylor*

El dezerto mi venas al vi  
Sur ĉevalo fajrhufita,  
Pasanta la ventojn mem  
Per deziro rapidigita.  
Sub fenestro vokadas mi,  
De meznokto aŭdata ree:  
Mi amas vin, mi amas vin,  
Kun amo mortonta ne  
Ĝis sunmalvarmec',  
Kaj stelmaljunec',  
Kaj malfaldo de libro de juĝec'.

Tra fenestro estu vidata  
Pasio kaj mia dolor',  
Sur sablo svenigas min  
Via tro kruisega kor'.  
Vian frunton tuŝu vent',  
De mia ĝemhejt', ho ve,  
Kaj varbu vin aŭdi pri  
La amo mortonta ne  
Ĝis sunmalvarmec',  
Kaj stelmaljunec',  
Kaj malfaldo de libro pri juĝec'.

Nokte mi estas sendata  
Per la febro en brusto mia,  
Por paco de vi donata  
Per vort' el latiso via.  
Malfermu la pordon do  
Al ĉambro kaj koro, ke  
Miaj kisoj instruu vin  
Pri la amo mortonta ne  
Ĝis sunmalvarmec',  
Kaj stelmaljunec',  
Kaj malfaldo de libro pri juĝec'

Tradukis

*Ivy Kellerman*

# WORLD PROGRESS

Every month attests more and more the vitality of Esperanto, the tremendous weight and momentum of the movement and the futility of opposing its headway. Where one society disbands, two are formed; a periodical quits the field, but two more take its place. The total number of societies in the world was 1371 in March, 1418 in April. There are now eighty-six Esperanto periodicals. After a most bitter and unrelenting war against Esperanto in Europe it is emerging stronger than ever before, as attested by the confident tone and constantly increasing number of periodicals. In the face of broadcast newspaper articles by critics in the United States, who have not hesitated to repeat the ridiculous statement that "Esperanto is on the decline," seven new periodicals have appeared in this country in the past year, and by a conservative estimate their combined circulation must be six times that of a year ago. The movement is certainly twice as strong in America as it was a year ago. A remarkable proof of present growth is furnished by the American Esperantist Company, the principal supply house for Esperanto literature in this country, which reports that the month of May showed an increase over April, while by all precedents May, which is a semi-summer month in the business world, should have shown a large decrease. Parallel with these increases in number and confidence of adherents are such events as the endorsement of the language by the Pan-American Scientific Congress, the International Medical Congress, International Congress of Dentists, government and municipal support in many widely-separated places.

*Samos.*—An island of the Mediterranean, whose language is Greek, and government Turkish. Events in this island last year form a convincing argument of the need of an international language, if such a thing can be used to dispel the dense religious bigotry of which, unfortunately, Samos does not control the entire supply. A petition, couched in terms which might have been stolen from an ancient monastery, was presented to the prince governor of the island, representing that the Esperantists with their new-fangled language were either Freemasons or Papists (!!) and that anyhow their society could certainly bring no good to the Greek church, and that Satan was doubtless in intimate league with the Esperantists. On this representation the prince, evidently a jolly good fellow, disbanded the society and used their hall to quarter his guard. That the island has since had a revolution is probably not due to the Esperantists.

*Poland.*—Polish Esperantists are to hold a national convention and Esperanto Exposition at *Čenstokova* this summer.

*Russia.*—In addition to the long list of recent events by which Esperanto attests its growing popularity in Russia, which was published here in April, it is worth noting that a new Russian Esperanto dictionary of 470 pages has been issued. It is edited and published by Prof. E. V. Radvan Rapinski, Str. Larotnaja d. 14, loĝ. 31, St. Petersburg.

*Belgium.*—The city council of historic Antwerp gives an annual subsidy of five hundred francs to the Esperanto groups of that city. A local has recently been organized in Ghent. At Verviers, fifty young men of the national temperance society are studying Esperanto. Many prominent newspapers are publishing articles favorable to Esperanto.

*Brazil.*—The national Bureau of Statistics recently published its annual report in three languages—French, Portuguese and Esperanto. Much pro and con comment was elicited from the newspapers by the use of Esperanto.

*Chile.*—The great success attained by the Chileans in securing the recommendation of Esperanto by the Pan-American Scientific Congress entitles them to a brief repose, which they proceeded to take during February, the month corresponding to our August. The latest reports from Chile are therefore dated January.

*Hungary.*—The Hungarians seem to have had occasional trouble over the matter of local leadership—an affair by no means peculiar to Esperanto matters. A new magazine now appears—*Hungara Esperantisto*, organ of the Hungarian Esperanto Society, price 85 cents per year, address Budapest, VII., Alpar U. 8. The Hungarians anticipate a lively time at the International Medical Congress, and it is safe to predict that those physicians who have learned Esperanto will be doubly fortunate during the Congress.

*Portugal.*—May number of the new Esperanto periodical, *Portugala Revuo*: At Porto, Esperanto propaganda is made every day; an Esperanto *festó* was held in May. Free courses at Gaya. At Lisbon, special *festó* April 21, prizes being awarded the best students of the courses just finished. Reports were printed in the four leading journals of the city.

*Philippines.*—At last report there were 698 members of the Philippine Esperanto Society.

